

ROMANO PRI LA TRI REGNOJ

DE LUO GUANZHONG
ELĈINIGIS LAŬLUM

Unua volumo




ĈINA FREMDLINGVA ELDONEJO

ROMANO PRI LA TRI REGNOJ

DE LUO GUANZHONG
ELĈINIGIS LAŬLUM

En tri volumoj



Serio "Oriento-Okcidento"

n-ro 44

sub aŭspicioj de la Universala Esperanto-Asocio
en oficialaj rilatoj kun Unesko

ĈINA FREMDLINGVA ELDONEJO
BEIJING ĈIINIO 2008

Unua Eldono 2008

ISBN 978-7-119

© Fremdlingva Eldonejo, Beijing, Ĉinio, 2008

Publikigita de la Fremdlingva Eldonejo

24 Baiwanzhuang-Vojo, Beijing 100037, Ĉinio

<http://www.flp.com.cn>

Distribuata de la Ĉina Internacia Librokomerca Korporacio

35 Chegongzhuang Xilu, Beijing 100044, Ĉinio

<http://www.flp.com.cn>

Poŝtkesto 399, Beijing, Ĉinio

Presita en la Ĉina Popola Respubliko

PRONONCAŜLOSILO DE LA PROPRAJ NOMOJ EN LA ROMANO

La ĉinaj propraj nomoj latinigitaj laŭ la ĉina oficiala sistemo povas esti prononcataj kiel la Esperantaj kun jenaj esceptoj:

ch = ĉ h = ĥ j = ĝj q = ĉj r = ĵ sh = ŝ w = ŭ x = ŝ y = j
zh = ĝ ai = aj ei = ej ao = aŭ ou = oŭ ia = ja ian = jan ie = je
iao = jaŭ iou = joŭ uo = ŭo uai = ŭaj uei = uj uan = ŭan
uang, wang = ŭang weng = ung yu = ju ŭ kaj u post j, q, x = ju

Antaŭparolo

En 1978, kiam mi ĉeestis la 63-an Universalan Kongreson de Esperanto en Varna, usona s-ano laboranta kiel volontulo ĉe UEA proponis al mi esperantigi la ĉinan klasikan *Romanon pri la Tri Regno*j. Mi iom miris, ĉar mi ne atendis, ke tiu ĉina klasika romano ĝuas popularecon ankaŭ en Usono.

En mia infaneco mi ne nur vidis imponan statuon de la heroo generalo Lordo Guan, diiĝinto de la *Romano pri la Tri Regno*j, en la templo de mia hejmvilaĝeto por li kaj liaj filo Guan Ping kaj asistanto generalo Zhou Cang, sed ankaŭ aŭdis interesajn rakontojn pri lia amikiĝo kun la pli aĝa Liu Bei, kiu poste fariĝis reĝo kaj imperiestro de unu el la tri regnoj Shu, kaj la pli juna ĵurfrato generalo Zhang Fei justama kun eksplodema temperamento, kiu fortimigis potencon persekutantan trupon de Cao Cao per siaj kriegoj; pri la fideleco de Lordo Guan al Liu Bei kaj lia protektado de la edzinoj de la pli aĝa amiko dum la vivo post sia kaptitiĝo ĉe la malamiko Cao Cao; pri liaj heroaj bataloj tra kvin pasejoj kaj mortigo de ses generaloj de Cao Cao; kaj pri lia tralaso de Cao Cao en ties fuĝado post terura malvenko. En nia vilaĝeto iu s-ro Zhang bone sciis kaj rakontis al ni multajn interesajn epizodojn de tiu Romano, kaj pri la saĝa kaj lojala ĉefministro Zhuge Liang, kiu akiris centmilon da sagoj per ŝipoj kun pajlaj faskoj, kaj pri la ambicia, ruza kaj perfidema Cao Cao, kiu mortigis la bonkoran amikon de lia patro LüBoshe. Mi ankaŭ spektis prezentadojn de operaj aktoroj kaj rakontistoj kun tambureto aŭ trikordo¹ pri epizodoj de tiu *Romano pri la Tri Regno*j. Tiu ĉina klasika romano estas tiel populara en Ĉinio, ke preskaŭ ĉiuj familioj scias ion pri ĝi kaj preskaŭ ĉiuj librejoj kaj bibliotekoj disponas tiun romanon. Ne nur en lernolibroj por geknaboj troviĝas ĝiaj fragmentoj elektitaj kiel legaĵoj literaturaj, kaj la intelektuloj ĝin legas kaj relegas, ankaŭ analfabetoj konas ĝin dank prezentado de operoj, rakontistoj, filmoj, radio kaj

¹ Trikordo – ĉina pluka kordinstrumento kun tri kordoj kaj longa fingrotabulo.

televido.

Same kiel *Ĉe Akvorando, Pilgrimo al la Okcidento* kaj *Ruĝdoma Sonĝo*, la *Romano pri la Tri Regnoj* estas unu el la kvar plej popularaj ĉinaj klasikaj romanoj. Ĝi diferencas de la aliaj per tio, ke ĝi estas historia romano, komparebla kun *Iliado* aŭ historiaj dramoj de Ŝekespiro en iuj aspektoj. Ĝi estas la unua klasika romano, kiu multe influis la kreadon de tiu literatura genro en Ĉinio. En tiu ĉi majstra verko ĉirkaŭ mil personoj sursceniĝas, el kiuj centoj ludas aktivajn rolojn. Ĝi priskribas pli ol cent diversajn batalojn – surprizatakojn, kampanjojn, militadojn per incendio aŭ diluvo, batalojn surterajn kaj surakvajn, aplikon de diversaj taktikoj, artifiko kaj mahinacioj, utiligon de spionoj kaj perfiduloj. En la romano malmultaj virinoj estas priskribitaj, tamen ili ludas sufiĉe gravajn rolojn.

Ĉar tiel multe ĝi sin okupas pri milito, pri bataloj kaj kampanjoj, multaj ĉinaj kamparanaj ribeluloj kaj revoluciuloj, same kiel militaristoj, uzis ĝin kiel poŝlibron por sin helpi en militaj manovroj. Eĉ iuj komercistoj en la moderna tempo prenas ĝin por lerni strategion kaj taktikojn por prosperigi sian entreprenon. Hodiaŭ kiam kino, radio kaj televido altiras al si amasojn de la intelektuloj, interesaj programoj kaj filmoj estas produktitaj kaj produktataj adoptante partojn aŭ tuton de la romano. La *Romano pri la Tri Regnoj* estas eldonata samtempe de dekoj da ĉinaj eldonejoj kaj vaste vendata tiel en la urboj kiel en la kamparo. Por fari seriozajn studojn kaj esplorojn pri tiu romano, en Ĉinio fondiĝis speciala societo kaj de tempo al tempo aperas artikoloj kaj disertaĵoj pri la vero kaj fikcio en tiu romano, pri ĝiaj literaturaj kaj kulturaj valoroj, pri ĝiaj objektoj, pri ĝia strukturo, pri ĝiaj ĉefaj figuroj, pri la artistaj tektinikoj aplikitaj en la verko ktp. En multaj sferoj, la *Romano pri la Tri Regnoj* ankoraŭ havas sian influon al la sintenoj kaj kondutoj de la ĉina popolo, tial ĝi estas valora legaĵo por fremdlandanoj, kiuj deziras koni la ĉinan popolon kaj la ĉinan kulturon.

La *Romano pri la Tri Regnoj* estas historia romano pri la periodo de la jaro 168 p.K. kiam la Orienta Han-Dinastio

kolapsiĝis, pro la enpotenciĝintaj eŭnukoj kaj leviĝo de la ribelaj kamparanoj konataj kiel flavkaptukuloj, kaj disfalis en la Tri Regnojn, ĝis la jaro 280 p.K., kiam la Okcidenta Jin-Dinastio reunuigis Ĉinion. Ĝi estas unika en priskribo de tiom longa historia periodo. Ĝiaj ĉefaj roluloj, kiel ekzemple la tri fidelaj amikoj Liu Bei, Guan Yu kaj Zhang Fei, Zhuge Liang kaj Zhao Yun, kiuj fondis Shu-Regnon, la ambicia Cao Cao, lia filo Cao Pi kaj lia milita konsilanto Sima Yi, kiuj fondis Wei-Regnon, Sun Quan, Zhou Yu kaj Lu Su, kiuj fondis Wu-Regnon, vere vivis kaj aktivis en tiu historia periodo de pli ol cent jaroj; kaj la famaj kampanjoj ĉe la Ruĝa Rokmuro kaj Guandu vere okazis. Kaj la kampanjo ĉe Guandu estas ofte citata de strategiistoj kiel brila ekzemplo venki potencon armeon per malgranda trupo.

Post la eksplodo de la Rezistmilito kontraŭ la Japanaj Agresantoj en 1937, mi devis migri de Norda Ĉinio al la Sudo tra la provincoj Henan, Hubei, Shaanxi kaj Sichuan. Mi trapasis nombron da historiaj lokoj menciitaj en la *Romano pri la Tri Regno*. Interalie, mi trairis la urbon Luoyang, unu el la ĉefurboj de Han-Dinastio, la urbon Xuchang, la ĉefurbo de Wei-Regno, la urbon Nanyang, kie vivis en pajlkabano Zhuge Liang, la fama ĉefministro de Shu, la persono plej multe kaj vivece pripriskribita en la verko, la urbon Mianyang, kie estis la tombo de Ma Chao, feroĉa generalo de Shu-Regno, la urbon Gucheng, kie rekuniĝis Lordo-Guan kun sia pli juna ĵur-frato Zhang Fei, kaj mortigis generalon Cai Yang de Cao Cao, la urbon Hanzhong, pro kiu okazis grandaj bataloj kaj la gravan strategian Jianmen-Pasejon; mi vizitis la historian lokon Luofengpo (Feniksofala Deklivo), kie mortis Pang Tong, la fama milita konsilanto de Shu; mi loĝis dum 9 jaroj en Chengdu, la ĉefurbo de Shu-Regno, kaj vizitis la Templon por Zhuge Liang. Dume mi aŭdis multajn rakontojn pri herooj de tiu romano. La historiaj lokoj ĉiam atestas por ni la verecon de la plejparto de epizodoj priskribitaj en tiu historia romano.

Efektive la romano estas vrkita surbaze de du gravaj historiaj verkoj. S-ro Chen Shou (233 p.K. – 297 p.K.), kiu servis kiel

oficisto de Shu-Regno kaj poste kiel oficisto de la Okcidenta Jin-Dinastio, kolektis en 274 p.K. verkaĵojn de Zhuge Liang kaj poste verkis en la jaro 280 p.K., kiam Jin unuigis la imperion, la libron *San Guo Zhi* (*Tri Regnoj aŭ Kroniko de la Tri Regnoj*) kun 65 ĉapitroj, konsistantaj el biografioj pri la ĉefaj gvidantoj de tiu periodo. Wei-Regno estis prezentita per 30 ĉapitroj, Shu-Regno per 15, kaj Wu-Regno per 20. En tiu verko, Wei estis rigardata kiel la legitima daŭriganto de Han-Dinastio. 90 jarojn post la forpaso de Chen Shou, alia instruitulo Pei Songzhi (372 p.K. – 451 p.K.) de la Sudaj Dinastioj (420 p.K.– 689 p.K.) faris abundajn notojn al la verko de Chen Shou, konsultante pli ol 140 librojn, inter kiuj iuj opinias, ke Shu estis la legitima daŭriganto de Han-Dinastio, kaj tiun opinion s-ro Luo Guanzhong, la aŭtoro de la *Romano pri la Tri Regnoj*, alprenis al si en sia verkado.

Luo Guanzhong verkis la Romanon pri la Tri Regnoj surbaze de tiuj historiaj verkoj, tamen li ne sekvis iliajn ekzemplojn, sed ŝanĝis iujn detalojn laŭ la bezono de la beletra arto, kaj rezulte de tio tridek procentoj de la romano konsistas el fikcio. Ekzemple, la Kroniko de la Tri Regnoj rakontas, ke Liu Xuande estis nomumita kiel guberniestro de Anxi-Gubernio pro sia merito en batalado kontraŭ la flavkaptukuloj, kaj post lia enposteniĝo, inspektoro vizitis la gubernian urbon pro ofico. Liaj viroj baris la vojon al Xuande al la oficejo, kaj tiu ĉi kolere batis la inspektoron kaj fuĝis. La dua ĉapitro de la *Romano pri la Tri Regnoj* elektis tiun epizodon kaj faris ŝanĝon de detalo: la inspektoron batis ne Xuande, sed Zhang Fei, kiu koleriĝis pro la maljusta sinteno de la aroganta inspektoro. La ŝanĝo de tiu detalaĵo utilas por priskribi la karakteron de la justama tamen malpaciena Zhang Fei kaj nuligis tiun makulon en la konduto de Liu Xuande, kiu estis sincera, honesta, fidela, lojala, bonkora kaj diskreta. La ŝanĝoj de iuj detaloj ne multe tuŝas la karakteron de tiu historia romano.

Alia influo al la verkado de la *Romano pri la Tri Regnoj* far Luo Guangzhong estas la folkloro. En Sui-Dinastio (581 – 618 p.K.) jam aperis operoj pri Cao Cao kaj Liu Bei, kaj Imperiestro Yangdi rigardis ties prezentadon. En Tang-Dinastio renoma poeto

Li Shangyin verkis en 849 p.K. la poemon Kara Filo, en kiu liaj versoj “*Li aŭ imitis Zhang Fei la hirtbarban, aŭ mokridis pri Deng Ai l’ balbuton*”, montras al ni, ke en Tang-Dinastio infanoj ŝatis rigardi teatroludojn pri Zhang Fei kaj aliaj herooj de la Tri Regnoj. En Norda Song-Dinastio (960 – 1127 p.K.) fama poeto Su Shi (alnomata Dongpo. 1037 – 1101 p.K.) skribis en eseo: “Buboj de kotaj stratetoj forlasas siajn mizerajn loĝejojn kun moneroj por aliĝi al la aŭskultanta amaso ĉirkaŭ la rakontisto. Kiam li prezentas la malnovajn rakontojn pri la Tri Regnoj, ili kuntiras la brvojn kaj iliaj okuloj eklarmas pro malvenko de Liu Xuande, sed ili ridas laŭte pro malvenko de Cao Cao.” Tio montras, ke la rakontoj estis por Liu Xuande kaj kontraŭ Cao Cao, kaj atingis drastan efekton. En Norda Song-Dinastio aperis fama rakontisto Huo Sijiu, kiu sin okupis ĉefe pri rakonto de epizodoj de la Tri Regnoj. Dum la regado de Imperiestro Renzong, aperis operoj de led-figuraj ombroj pri la Tri Regnoj. En Yuan- kaj Jin-Dinastioj aperis operoj pri herooj Liu Bei, Guan Yu, k.a. Laŭ verko de Tao Zongyi, kvin operoj pri la Tri Regnoj estis popularaj tiel en la norda Ĉinio sub la regado de Jin-Dinastio, kiel en la suda Ĉinio sub la regado de la Suda Song-Dinastio. Tiuj operoj estis *Sanga Batalo ĉe la Ruĝa Rokmuro, La Murdo de Dong Zhuo, La Kunveno ĉe Xiangyang, La Granda Liu Bei kaj Insulto al Lü Bu*. En Yuan-Dinastio (1206-1368 p.K.) produktiĝis pli ol 40 operoj pri la Tri Regnoj, el kiuj 21 postvivas ĝis nun. En la regperiodo Zhizhi de Yuan-Dinastio (1321-1323 p.K.) eldoniĝis *La Plene Ilustrita Historia Romano pri la Tri Regnoj* en tri volumoj. La paĝoj de tiu verko dividiĝas en du partojn unu super la alia. Lla supra estas bildo kaj la suba estas teksto, kiu ampleksas ĉ. okdek mil ideogramojn (t. e. preskaŭ dekono de la *Romano pri la Tri Regnoj* de Luo Guanzhong.) Ĝi portas fortan koloron de folkloro kaj evidente estas kompilita el tekstoj uzataj de rakontistoj. Ĝia lingvo estas vulgara, tamen ĝi jam elmetis la konturojn de la posta literatura verko de Luo Guanzhong, kiu kredeble konis ĝin kaj la cirkulantajn anekdotojn kaj operojn pri la Tri Regnoj en sia tempo. Se ni faras komparon de la verko de Luo Guanzhong

kun la popolaj rakontoj, la operoj kaj la *Plene Ilustrita Romano pri la Tri Regnoj*, ni povas klare vidi, ke Luo Guanzhong ne estas simpla redaktoro aŭ kompilanto. Lia *Romano pri la Tri Regnoj* faris grandan salton dank lia artistia strebado.

La plej frua el la multaj eldonoj de la *Romano pri la Tri Regnoj* aperis en la unua jaro de la regperiodo Jajing de Ming-Dinastio (1522 p.K.). Tiam ĝi portis la titolon *Sanguozhi Tongsu Yanyi* (*Historia Romano por Populara Legado Bazita sur la Kroniko de la Tri Regnoj*). Ĝi konsistis el 24 volumoj kun 240 epizodoj. Ĝi havis antaŭparolon verkitan de Yongyuzi en la sepa jaro de la regperiodo Hongzhi de Ming-Dinastio (1494 p.K.), kaj ankaŭ enkondukon verkitan de Xiuranzi, en 1522 p.K. Tiu versio estis faksimile represita de la Komerca Eldonejo en 1929 kaj refoje de la Popola Literatura Eldonejo en 1974.

Mao Lun kaj lia filo Mao Zonggang, dum la regado de Imperiestro Kangxi de Qing-dinastio, faris tralaboron al la antaŭaj eldonoj de la romano, kaj forigis aŭ ŝanĝis multajn el la versaĵoj kaj detalojn de la intrigo. Ili ankaŭ aldonis ampleksan komenton. Beligante la lingvon de la verko, ili samtempe ankaŭ injektis siajn proprajn opiniojn en la romanon. Malgraŭ tio, la eldonos de Mao Zonggang estas multe pli bona ol la aliaj versioj, kaj ĝi fariĝis la plej populara eldono dum Qing-Dinastio. Tiu eldono aperis en la 18-a jaro de la regperiodo Kangxi (1679 p.K.) kun prefaco de Li Yu.

En 1954, la Popola Literatura Eldonejo publikigis version bazitan sur la versio de Mao Zonggang, konsultante la eldonon de 1522, kaj ampleksa revizio estis farita al la teksto inkluzive de korektado de personaj kaj geografiaj nomoj. Plia revizio estis farita de la sama eldonejo en 1973, kaj tiu ĉi Esperanta traduko estas bazita sur tiu versio.

Pri la aŭtoro Luo Guanzhong mankas biografio. En la *Suplementa Registro pri Forpasintaj Personoj* de Jia Zhongming de Ming-Dinastio, troviĝas mallonga noto pri Luo Guanzhong:

Luo Guanzhong, ano de la urbo Taiyuan, kun pseŭdonimo

Migranto ĉe Lago kaj Maro. Viro inklina al soleco, lertia en verkado de poemoj de Yuefu-stilo, estas pura kaj honesta persono. Ni amikiĝis malgraŭ la diferenco en niaj aĝoj. Li estas viro spertoriĉa. Li multe vojaĝis. Ni renkontiĝis antaŭ pli ol 60 jaroj, kaj poste mankis al mi informo pri li.

Laŭ la supra noto, ni povas konjekti, ke li naskiĝis en Yuan-Dinastio kaj mortis en la fruaj jaroj de Ming-Dinastio. Iuj studentoj asertas, ke li naskiĝis ĉ. 1330 kaj forpasis ĉ. 1400 p.K. Iuj diras, ke li naskiĝis en Dongping-Gubernio de Shandong-Provinco, aliaj asertis, ke li naskiĝis en Hangzhou de Zhejiang-Provinco. Li verkis dekojn da noveloj kaj romanoj kaj partoprenis la kreadon de la romano *Ĉe Akvorando*. La *Sanguozhi Tongsu Yanyi* (Historia Romano por Populara Legado Bazita sur la Kroniko de la Tri Regnoj) estas lia ĉefverko. Lia granda sukceso en verkado de romanoj faris lin grava verkisto en la historio de la ĉinaj romanoj.

Ne nur individuaj studentoj sed ankaŭ pluraj enciklopedioj, kiel tiuj de Britio, Ĉinio, Francio, Japanio kaj Rusio, alte taksas la *Romanon pri la Tri Regnoj* kiel gravan kaj valoran literaturan verkon de la mondo. En Japanio plej frue aperis ĝia kompleta traduko de Tsukido (plumnomo) en la periodo 1689-1692 p.K. kaj hodiaŭ pli ol dekduo da diversaj japanaj versioj estas en cirkulado kaj inter ili 5 estas kompletaj tradukoj. Ankaŭ en la korea lingvo aperis pluraj versioj inter kiuj estas 3 kompletaj tradukoj. En la angla aperis 16 tradukaĵoj de la romano kaj inter ili estas 3 kompletaj tradukoj. En la malaja lingvo aperis 2 kompletaj tradukoj, en la java, manĉura kaj vjetnama lingvoj aperis po unu kompleta traduko. Tradukoj de ĝiaj partoj aperis ankaŭ en la estona, franca, germana, itala, kamboĝa, laosa, latina, malaja, mongola, nederlanda, pola kaj taja lingvoj.

Ankaŭ en Esperanton oni jam tradukis fragmentojn de la *Romano pri la Tri Regnoj* kaj prezentis en la gazeto *El Popola Ĉinio* kaj la Ĉina Radio Internacia. En la 71-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en 1986 en Pekino, iu ĉina

samideano eĉ kantis kanton el la opero *Artifiko per Malplena Urbo*. Tio interesis certajn samdeanojn alilandajn. Ni esperas, ke tiu ĉi kompleta traduko de la romano trovos pli vastan legantaron kaj helpos alilandajn esperantistojn en konado de la ĉina popolo kaj ĝiaj literaturo kaj kulturo.

Laŭlum, 2008 05 20, Pekino

昭烈帝

火繞房災隱
 驚王匹肅同
 也恢舊物二
 顧感
 隆中輔弼皆
 龍鳳
 身盡虎龍
 臥穴鑽
 龍
 魂繞北
 周宮
 二面山民



Liu xuande

關壯繆

神威能奮發
天曰心如鏡
春秋義薄雲
雅更知文

古夫雙松館主人謹摹



Guanyu

諸葛亮

撥亂扶危
才過管樂
陳二圖師
公全盛德
應歎古今
無
策勝孫吳
二八陳圖
起
孤英

洛溪釣徒



Zhuge Kongming

趙雲



Zhao Zilong

勇績當陽著常山屢建功彼軍都似
此將克己龍膽量魁西蜀威名紀漢中
幽香全幼主千載更誰同 仰臣書

董
卓

霸業成時為帝主不成
且作富家郎誰知
天意各私曲鄙
鳩方成已滅亡

寄雨



Dong Zhuo